

Heinrich Heine,  
Teksista kanto

*tradukita de Alfred Conzeth*

*Tiu kvarstrofa versio de la poemo, kiun tradukis Alfred Conzeth, aperis en 1844-07-10 en la Pariza revuo "Vorwärts" (= "Antaŭen"), la organo de germanaj elmigrintoj.*

Nenia larmeto en sombraj okuloj,  
Jen sidas teksistoj, mizeraj povruloj;  
Germana Praregno, mort-tukon ni teksas,  
Kaj en ĝin trioblan malbenon ni plektas!  
Ni teksas, ni teksas, teksadas!

Malbenon al Dio, la blinda, la surda,  
Al kiu ni preĝis en kredo absurda.  
Ni vane esperis, ni vane predikis.  
Li trompis simie, nin eĉ mistifikis!  
Ni teksas, ni teksas, teksadas!

Malbenon al Reĝo, al reĝ' de riĉuloj,  
Ne vidas suferon de ni mizeruloj!  
Li premas el ni la lastan pundon  
Kaj lasas mortigi nin kiel hundon!  
Ni teksas, ni teksas, teksadas!

Malbenon al nia Patrujo maljusta,  
Jen kie prosperas nur trompo embuska!  
Jen kie ĉe putro nur morta kaduko -  
Germana Praregno, jen via mort-tuko!<sup>2</sup>  
Ni teksas, ni teksas, teksadas!

*Traduko de la Germana poemo "Weberlied" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de ALFRED CONZETH (\*1913-12-08 – †1998-05-16).*

*Arg-242-674 (2005-11-20 19:17:42)*

*Alfred Conzeth vivis en Mettmann ĉe la germana urbo Düsseldorf. Li estis profesia presisisto kaj korektisto ĉe la eldonejo Droste en Düsseldorf. Li mem eldonis Esperanto-broŝurojn kaj diversajn tradukojn kaj tradukis ankaŭ mem. Li estis dum multaj jaroj la eldonisto de la informilo de la Esperanto-Societo de Düsseldorf, la "Radsaltanto". [Laŭ informo el la libro "Esperanto - ein Ausweg aus Babylon? 95 Jahre Esperanto in Düsseldorf", eldonita en 2002 de Edeltraud kaj Max Hans-Jürgen Mattusch kunlabore kun la Esperanto-Societo Düsseldorf]*

---

<sup>2</sup>Alfred Conzeth skribis "Germana Reĝujo". Mi, Manfred Retzlaff, anstataŭigis la vorton per "Praregno"; ĉar tiu ŝajnas al mi pli konvena.